# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale



PLENUMITA 18/11/2021 Kvincentkvindeksepa eldono (unua eldono 20/09/2011)



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;


***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro*
*lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Forĵetu viajn vortarojn. Uzu** *Google Translate* **kiel vortaron**

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 805,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **284,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **223,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **192,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **106,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde aprilo 2022)

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.



**La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5- minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.**



**Esperanta Retradio**

La fruaj 30-aj estas la plej feliĉaj vivojaroj 3/11/2021

**Artikoloj por AE**. Se vi trovas taŭgan artikolon por AE kaj ne fidas vian Esperantan nivelon, uzu la aŭtomatan tradukilon de Guglo kaj sendu ĝin rekte al AE rogerspringer@tpg.com.au;

## Mi serĉis la interreton por kontraŭ militaj Aŭstraliaj politikaj partioj.

*Australian Citizens Party* *View Email in Browser (enudgemail.com.au)*
*The Socialist Equality Party, SEP* La nunaj politikistoj nur helpas Usonajn militojn.
*Green Party* Eble? sed ili ne tiel klare esprimas sian kontraŭon *Roger Springer*

**Kontraŭ milito.** Laŭ mi, ĉi foje, la plej grava voĉdona promeso de la politikistoj por gajni vian voĉdonon estas ne plua partopreno en fremdaj militoj.



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas je 10.30 atm ĝis 12tm je la unua kaj tria sabatoj de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.
La 20a de novembro estos la tria sabato. Venu! *Roger Springer*


## 3ZZZ

Sciencistoj serĉas solvojn por plenigi la homajn benzonojn pli bone respektante nian planedon, sen uzi tro da tero. En la elsendo de la 15a de novembro 2021 vi aŭdos pri krei akvon el la aero kaj kiel la Finnoj kreas artefaritan kafon

Informas *Franciska Toubale*



## Kial la homa raso malkreskas? AE556




Kara Roger,
Jen demandoj por la legantoj pri via artikolo pri la nombro da homoj sur la tero.
Ĉu vi nur skribis tion por provoki legantojn skribi respondon?

## KIOM DA HOMOJ LA MONDO SUBTENUS?


Ĉu 10 miliardoj? Ĉu 20 miliardoj? Kiam ĉesus kreski la nombro?
Ĉu ĉiuj el tiuj havus la saman materialisman vivstilon kiel ni en Aŭstralio kaj aliaj riĉaj landoj?
El kie ni trovus tiom da materialoj? Ĉu Antarktio? Pro protektado, feliĉe ne ĝis almenaŭ 2048.
Ĉu la luno aŭ marso?
Ĉu teknologio solvos ĉiajn problemojn, kiel, nia ĉefministro kredas?
Roger skribis en sia artikolo *'La mondo nun ne havas tro multajn homajn problemojn,"*
Do eble ni ne bezonas teknologiajn solvojn ĉar ni ne havas problemojn? *Terry Manley*



---

Mi enmetis la artikolon en AE556 ĉar mi preferas havi iom da bonaj novaĵoj
Iliaj solvoj timigas min. (kiel militoj, malsategoj, malamoj, virusoj, ktp)
Fakte, en Ĉinujo kie oni provis la nur unu infana regulo, ili antaŭ ne longe ŝanĝis al 2 infanaj familioj kaj nun al 3 infanaj. Sed la popolo iĝas pli riĉa kaj ne deziras malriĉigi sin per pli da infanoj.
Mi petas ĉiujn respondu al la demandoj de *Terry* *Roger Springer*






**RAPORTO**: 75 Eŭropaj plene vakcinitaj atletoj mortis aŭ grave malsaniĝis pro "subitaj" koratakoj en la pasintaj 5 monatoj.
La amaskomunikiloj daŭre ignoras la aferon, kiu postulas plian seriozan esploron.

REPORT: 75 European Fully Vaccinated Athletes Have Died or Became Seriously Ill From "Sudden" Heart Attacks In the Past 5 Months – The Greanville Post *Roger Springer* (notu, mi estas duoble vakcinita.)

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*




## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). N.ro 61 de "Por Komencantoj".

GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Demandoj: A). Diru, en kiuj kazoj la vorto antaŭ "homoj" aŭ antaŭ "fiŝo" estas epiteto: "manĝantaj homoj"; "manĝintaj homoj"; "manĝontaj homoj"; "manĝata fiŝo"; "manĝita fiŝo"; kaj "manĝota fiŝo".




B). Kio estas prepozitivo?

C). El kiuj vortspecoj konsistas "kombinita prepozicio"?

2). En la tria speco de komplementoj la difinata vorto estas sekvata de tuta frazo, de tuta propozicio suborda, ekzemple "Mia najbaro, kiu uzas sian aŭton ĉiutage, ...... .". La tuta suborda frazo, aŭ kelkfoje reduktita, estas la triaspeca komplemento. Ĝi nomiĝas "suborda propozicio". Ĝi rilatas al la antaŭvenanta determinato, difinato per, plej ofte komencanta, relativa pronomo, kia "kiu, kia, kiom". La difinito, ĉi tie nomata "antecedento", povas en la ĉeffrazo esti la subjekto aŭ la objekto, aŭ adjekto. La rilata pronomo povas esti en la subfrazo subjekto aŭ objekto aŭ adjekto, aŭ parto de tiuj; se ĝi estas (en la adjekto) prepozitivo, la prepozicio aperas antaŭ la pronomo.
Demando 1). Donu ekzemplon de tia prepozitiva pronomo.
La suborda frazo povas rilati al la ĉefa verbo de la ĉeffrazo, per la pronomo "kiel".
Demando 2). Donu ekzemplon kun tia pronomo "kiel".

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 557. *Marcel Leereveld.*

## La Tago de Toleremo, la 16an de novembro

Esperanto por UN

**Universala Esperanto-Asocio**, okaze de la Internacia Tago por Toleremo, **la 16-an de novembro 2021**, memorigas pri la celo de Unuiĝintaj Nacioj kaj UNESKO antaŭenigi interkompreniĝon inter kulturoj kaj popoloj. Tiu celo estas en la kerno de la Ĉarto de UN kaj de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, ĉar toleremo estas bazo por paco, plena observo de homaj rajtoj kaj daŭripova evoluigo por ĉiuj.

Toleremo estas respekto, akcepto kaj aprezo por la riĉa diverseco de kulturoj de nia mondo, de niaj formoj de esprimo kaj niaj manieroj esti homoj. Do, ni devas harmonie interagi kaj kunlabori por konstrui malfermajn kaj sekurajn komunumojn por ĉiuj.

Toleremo estas pli kaj pli necesa antaŭ la nuntempaj defioj. Antaŭ klimata krizo, sankrizo, perforta migrado, rasismo, ekstremismo kaj aliaj defioj, ni ĉiuj devas lerni pri diverseco kaj malfermiteco, kaj malkovri la kulturojn kaj kredojn de aliaj. Ni bezonas pli bonajn leĝojn, edukadon, aliron al informoj, kaj konsciigon.

Por esti toleremaj, ni bezonas kompreni unu la alian. Pro tio, UEA antaŭenigas multlingvismon kiel vojon por multobligi la eblecojn de plena interkompreniĝo. Speciale, ni utiligas Esperanton kiel ponton inter malsamaj lingvoj kaj kulturoj. Ni ĉiuj estas anoj de la sama mondo, tiel ni devas ĉiutage strebi, individue kaj komunume, al konstruado de la bezonataj toleremo kaj interkompreno.

Per vera toleremo, kiel diris la fondinto de Esperanto pri la parolantoj de lia lingvo, "... ni, membroj de la plej malsamaj popoloj, staras unu apud alia ne kiel fremduloj, ne kiel konkurantoj, sed kiel fratoj."

Informo de *Stefan Macgill* en EKo n°47 Sendas al AE *Franciska Toubale*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



**Kion mi faros se pligraviĝos**

## LA INTERBATALO INTER USONO KAJ ĈINUJO ?

Se ĝi ne pligraviĝos, mi daŭrigas vivi en kolonio de Usono, sed mi agitos por ke Aŭstralio fariĝu sendependa ŝtato, el la aparteno al Usono. Mi ne akceptus aparteni al Ĉinujo aŭ iu ajn ŝtato. Mi ne akceptus, ke Aŭstralio havu nukleajn aŭ biologajn armilojn.

Se la sendependeco de Aŭstralio daŭros, mi subtenos, vorte kaj age, tiun flankon en eventuala militema situacio, kiu flanko evitos militan agadon. Se tio estas Usono, mi propagandos subteni Usonon, kaj se tio estos Ĉinujo, mi propagandos subteni Ĉinujon. La starpunkto ne estas facile decidebla, ĉar ambaŭ registaroj montros sin aliaj ol ili vere agas. Tio estos la plej malfacila sed farenda ekzamenado. La homoj vivantaj en Ĉinujo kompreneble ricevas pli favoran propagandon, kaj mi kaj la homoj vivantaj en Aŭstralio (kaj Usono) ricevos pli da propagando favora al la agado de Usono (helpe de Aŭstralio). Mi esperas ke ni, en A.E.-oj, kune diskutos tiujn propagandojn de Aŭstralio kaj de Ĉinujo. Kaj ankaŭ en ne-Esperantaj organizoj. Pluraj homoj jam faras tion. La precipa laboro do estas, kiel trovi, kaj subteni, tiun flankon kiu plej forte agas kontraŭ armilaj militaj agoj kaj preparoj. Ni jam nun tre sukcese povas studi tion, kaj konsekvence kritiki tiun kiu plej militemas.

Momente la plej armila preparado estas tiu de Usono, precipe pri sia disvolvigo de nukleaj armiloj. Ĉiu kiu deziras agi kontraŭ armila milito do devos agiti kontraŭ Usono kun Aŭstralio. Se ŝi aŭ li ne faras tion, ŝi aŭ li kulpas pri posta milita suferado. Sed ni devas samtempe agadi kontraŭ certaj promilitaj agoj de Ĉinujo, kiel okupi insulojn kaj marojn, kaj devigi Formoson (Taywan) forlasi sian independecon. Sed ni estas partiecaj se ni kritikas nur unu flankon, kvankam la usona preparado nuntempe estas pli danĝera. *Marcel Leereveld.*

## SOLVOJ DE LA KVIZETOJ: *(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)*



1). A). Ili ĉiuj estas epitetoj.

B). Prepozitivo estas kombinaĵo de substantivo kun sia antaŭa prepozicio.

C). El adverbo kaj prepozicio.

2). A). "La seĝo, SUR KIU kuŝas la kato".

B). "Li laboras sammaniere kiel laboris lia patro".

*Marcel Leereveld.*